



Viziuloj: iru kuracisten

Irlando:
Post virinoj – viro

Slovakio:
Stabiligo – kaj malstabiligo

Elektronikaj libroj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo!



La plej ŝatataj e-libroj ĉi-momente estas:

La ŝtona urbo (Anna Löwenstein, historia romano)	14,40 €
Flugi kun kakatuoj (Trevor Steele, historia romano)	8 €
Ĉu rakonti novele? (noveloj de Johán Valano = Claude Piron)	5 €
Humuro laŭ skota maniero (Andrzej Pettyn, humuro)	5 €
Kromosomoj (Lorjak, humura romano)	5 €
Murdo en Esperantujo (Daniel Moirand, krimromano)	5 €
Neokazinta amo (Lena Karpunina, novelaro)	9 €
La bela petveturantino (Leopold Vermeiren, erotiko)	5 €

Viziuloj: iru kuracisten

8



Kiam eŭropaj ŝtatoj enkondukis komunan valuton, la eŭron, estis konsentite, ke tio ne signifas ekonomian union. Ĉiu ŝtato plue respondecu pri sia propra ekonomio, do – klare dirite – pri siaj ŝuldoj. Intertempe evidentiĝis, ke kelkaj ŝtatoj antaŭe kaj dume amasigis tiom da ŝuldoj, ke ili apenaŭ povas mem repagi ilin.

Irlando:

Post virinoj – viro

11

Post sukcesa prezidanteco de du virinoj Irlando refoje havas viran prezidanton, nome Michael D. Higgins (irlandgale: Mícheál Ó hUiginn).

Li ricevis pli ol milionon da voĉoj – la plej grandan nombron iam akiritan de prezidanto-kandidato en la historio de la moderna nacio. Tiele Higgins iĝas la 9a prezidanto de la Respubliko.

Veturilo „elstara”

15



FOTO DE LA KUVRILO: ECGFORM.COM

politiko

OPINIO	8
Viziuloj: iru kuracisten	
POLLANDO	9
Platformo por reformo	
KINARTO	9
Homaj rajtoj enfokusigitaj	
BRAZILIO	10
Programo prokrastata	
SLOVAKIO	10
Stabiligo – kaj malstabiligo	
IRLANDO	11
Post virinoj – viro	

moderna vivo

KOMUNISMO	12
Murdoj memorigitaj	
VETERO	12
Soifas ne nur homoj ...	
GASTRONOMIO	13
Sanige ... kaj sensukere	
OPINIO	14
Kie la kulpo?	
TURISMO	15
Veturilo „elstara”	
ĈINIO	15
Boato historia	
SPORTO	16
Alloga finalo	
RUMANIO	16
Sovaĝa sorto	

turismo

GERMANIO	17
Telfero super Rejno	

arto

MUZIKO	18
„Princo Igor” neniam aŭdita	

scienco

Memsanigaj materialoj?	20
------------------------------	----

novelo

Naiva elreviĝo	21
----------------------	----

lingvo

LINGVOSCIENCO	22
Spaco kaj lingvo – ĉu facila afero?	

libroj

La gramatikiloj de Esperanto laŭ ABC	24
Rigardo sur la milito en Alĝerio	26

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

> Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Eŭropo al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakte al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

> Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO	
		surface	aere	rete	3a kl.	1a klaso
Argentino	EUR	26	28	15,60	5,50	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,20	9,50	15
Aŭstrio	EUR	50	54	30	5,50	9
Belgio	EUR	50	60	30	5,50	9
Bosnio-Herc.	BAM	51	59	30,60	11	18
Brazilo	EUR	26	28	15,60	5,50	9
Britio	GBP	44	47	26,40	5	8
Bulgario	EUR	26	30	15,60	5,50	9
Ĉeĥio	EUR	39	43	23,40	5,50	9
Danio	DKK	375	405	225	41	67
Estonio	EUR	30	32	17,40	5,50	9
Finnlando	EUR	50	54	30	5,50	9
Francio	EUR	50	54	30	5,50	9
Germanio	EUR	50	54	30	5,50	9
Grekio	EUR	50	54	30	5,50	9
Hispanio	EUR	50	54	30	5,50	9
Hungario	HUF	8300	9400	4920	1530	2500
Irlando	EUR	50	54	30	5,50	9
Islando	EUR	50	54	30	5,50	9
Israelo	EUR	43	47	25,80	5,50	9
Italio	EUR	50	54	30	5,50	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,80	9	14
Kipro	EUR	39	43	23,40	5,50	9
Koreio	EUR	43	47	25,80	5,50	9
Kostariko	EUR	26	28	15,60	5,50	9
Kroatio	EUR	30	34	18	5,50	9
Latvio	EUR	30	34	18	5,50	9
Litovio	EUR	30	34	18	5,50	9
Luksemburgo	EUR	50	54	30	5,50	9
Malto	EUR	39	43	23,40	5,50	9
Nederlando	EUR	50	54	30	5,50	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,50	18
Pollando	PLZ	125	143	75	23	38
Portugalia	EUR	43	47	25,80	5,50	9
Rusio	EUR	26	30	15,60	5,50	9
Serbio	EUR	26	30	15,60	5,50	9
Slovakio	EUR	30	34	18	5,50	9
Slovenio	EUR	39	43	23,40	5,50	9
Sud-Afriko	EUR	43	47	25,80	5,50	9
Svedio	SEK	499	543	299,40	56	85
Svislando	CHF	82	88	49,20	9	14
Usono	USD	78	82	46,80	8	13

> aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albuera Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstro:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: aon.913548977@aon.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Reto: info@esperanto.ba.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Ed. Van-âncio III, Sala 303 70393-902 Brasília (DF) Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arnecasper@dbmail.dk.
- > **Estonia:** Ahto Siimson, Kastani vk.12-11, Paikuse alev, Pärnu maakond, EE-86602. Reto: ahto.siimson@esperanto.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: cafficejo@esperanto.fi.
- > **France:** Unuigo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: info@esperanto-france.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanz, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanz@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@Esperanto-ct.org.
- > **Hungara:** AbonaSoft Bt, HU-1093 Budapest, Bakáts u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860. Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250, Escazú. Reto: miaumiau@ice.co.cr.
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Poŝtel.: +371 26407174. Reto: margarita.zelve@gmail.com.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.178, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net.
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, North Shore City 0630. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina Gorecka, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando. Reto: sezonoj@kanet.ru.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Titova 6-24 606211 Lis-kovo, Nijhegorodskaja obl., Ruslando. Tel.: +7 83149-54961. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.008 4867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.rs.
- > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: stano.marcek@gmail.com.
- > **Slovenaj:**
 - > Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brancovic@os.htnet.hr.
- > **Kroata Esperantista Unuiĝo,** Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill, Bower Road, Wynsbere, 7800. Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå, Svedio. Reto: leif.holmlund@telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleidorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, 1500 Park Ave, STE 134, Emeryville, CA 94608. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: eusa@esperanto-usa.org.

Fine, sed ne adiaŭe

32a jarkolekto, numero 12 ... Denove jaro finiĝis. Kaj estis bona jaro. La redaktoro de la rubriko „Leteroj“, kiu kutime estas la unua, kiu ekscias, se legantoj ne estas kontentaj, apenaŭ ricevis mallaŭdajn vortojn. Tute male eĉ, venis literaj gratuloj pro la „pli bona diverseco de la revuo“ (n-ro 11), „pro inteligentaj analizoj“ (n-ro 2), „pro bonege ellaboritaj raportoj“ (n-ro 4), „en stilo, kiu nete superas tiun de naciaj komunikiloj“ (n-ro 8-9) ... Gratulojn do al ĉiuj korespondantoj de MONATO dise en la mondo kaj al la tuta redakta skipo!

Por la nova jaro 2012 MONATO provos sekvi la saman vojon kaj liveri al vi indajn raportojn kaj analizojn, kiujn vi ne legis aliloke, ne povas legi aliloke, ĉar por nia magazino raportas ja loka-

noj, kiuj konas la tieajn fonojn.

Ĉu do nenio ŝanĝiĝos la venontan jaron? Tamen. Unu iom drastan ŝanĝon ni faros. La rubriko „Enkonduko“ – tiu, kiun vi nun legas – malaperos en sia nuna formo. La ŝparitan lokon ni disponigos al aliaj rubrikoj, ĉar tro ofte en la lastaj jaroj aktualaj kontribuoj ne povis aperi pro manko de spaco. Se estos io speciale raportinda pri la vivo de MONATO, ekzemple pri la dungo de nova redaktoro, pri enkonduko aŭ forfalo de rubriko, tiam ni faros tion en speciala porokaza kontribuo.

Ho jes, alian detalon mi preskaŭ forgesis. En la 1a de januaro mi fariĝos emerito. Mi ne plu estos profesia esperantisto tiam. Sed mi ne intencas jam forlasi vin. Se la kolegoj, kaj vi, miaj legantoj, min eltenos, mi volonte plu



kunlaboros en mia plej ŝatata revuo kiel volontulo, same kiel tiom multaj inter vi. Tamen, ĉar tiu ĉi rubriko malaperos, mi lastan fojon, sed ne adiaŭe, diras al vi

Sincere via

Paŭl Peeraerts



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 32a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retpoŝto: info@fel.esperanto.be, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL_Antverpeno
- Facebook: <http://eo-eo.facebook.com/revuo.Monato>
- Ipernity: http://flandra_esperanto-ligo.ipernity.com

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paul Gubbins, 3 Arden Court, Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

teknika redaktoro:

Christina Schwarzenstein

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

- Arto: Claude Nourmont-Moon, 2 Om

Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellan-gasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

- **Leteroj:** MONATO, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

- **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono. Telefono 440-646-1482. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

- **Lingvo:** Andy Peetermans, Schaliehoevestraat 23, B-2220 Heist-op-den-Berg

Rete: lingvo@monato.net.

- **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario. Rete: medio@monato.net.

- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

- **Noveloj kaj Poezio:** sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: noveloj@monato.net.

- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

- **Scienco:** Krys Williams, 95 Tynybedw Terrace, Treorci, RCT CF42 6RL, Britio. Rete: scienco@monato.net.

- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net.

- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porze-llangasse 25/41, A-1090 Viena, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Pura kretenaĵo

Bonvolu, mi petas, sciigi al s-ro Pejno Simono, ke lia aserto „en la uniko-da epoko ankoraŭ plendi pri iksoj iomete ‘ex-modiĝas’” estas iomege ekster-moda.

Mi eĉ ne hezitas aserti, ke ĝi estas pura kretenaĵo. Efektive, ĉiutage mi ricevas dekon da ret-mesaĝoj redaktitaj en la fuŝa „ixperanto”, t. e. plenplenaj je iksoj, do apenaŭ kompreneblaj por mi, kiu konstante restis fidela al la zamenhofa lingvo. Multaj el tiuj ret-mesaĝoj venas de elstaraj esperantistoj, eventuale estroj de diversaj asocioj: videble, por ili Unikodo estas tute nekonata kaj mistera afero.

Videble, s-ro P.S. faras bedaŭrindan konfuzon inter siaj deziroj kaj la realaĵoj.

P.S. La nomo de Praesperanto I (1878) estis „Lingwe uniwersala”.

André Cherpillod
Francio

Geografiaj nomoj

Volonte mi reagu je la librecenzo de Pejno Simono rilate al geografiaj nomoj (MONATO 2011/10, p. 26). Antaŭ

multaj jaroj mia amiko Tibor Sekelj kaj mi estis estraranoj de Internacia Geografa Asocio. Tibor plurfoje vizitis min, kaj unu el niaj diskuttemoj estis geografiaj nomoj. Ni venis al tre simpla solvo de la problemo en Esperanto. Ĉiuj nomoj sekvu 2 regulojn:

1. Ĉiu nomo, originale skribita en lingvo kun „latinaj” literoj, restu neŝanĝita en Esperanto (Lyon, Windhoek, Buenos Aires, Palembang). Escepto estas nomoj, kiuj ricevis historie esperantigitan nomon (Novjorko, Roterdamo, Kaburbo).

2. Ĉiu nomo, originale skribita en lingvo kun „nelatinaj literoj”, sekvu la Esperanto-ortografion (tio okazas ankaŭ en aliaj (naciaj) latinliteraj lingvoj – Ajutaja, Tajpej, Charkov, Esfahan), kun la samaj esceptoj kiel sub 1 (Pekino, Moskvo, Hanojo). Kompreneble oni ĉiam povos interkrampe menci tiu prononcon aŭ la signifon, se dezirata kaj utila.

Kees Ruig
Nederlanda

Bondeziroj

Bonan novaĵon alportis MONATO (2011/10, p. 5), ke Krys Williams (al ni

bone konata kiel Ungar) estis elektita redaktoro de la rubriko „scienco”. Ĝojigas kaj kontentigas, ke ŝi post longa foresto revenis al Esperanto-aktivaĵo. Mi neniam povis akcepti, ke Krys ne plu aktivas, verkas kaj ke restis al ni kontentiĝi nur per ŝiaj publikaĵoj kaj aparte ŝatata, bela kaj pensiga poezio. Sed resti por longa tempo nur kun „Meznokto metropola” ne sufiĉis ...

Jerzy kaj mi, certe samkiel aliaj amikoj, sekvos vian reaktiviĝon. Akceptu niajn bondezirojn por nova, grava kaj respondeca laboro en la valora kaj prestiĝa MONATO.

Zofia Banet-Fornalowa
Pollando

Energio de la tegmento

Mi legis la tre interesan artikolon kun la titolo *Energio de la tegmento* de Evgeni Georgiev (MONATO 2011/7, p. 20). Mi gratulas pro la enhavo, kiu koncernas min multe, ĉar mi ĵus fariĝis emerita tegmentisto! Ankaŭ plaĉas al mi la vort-uzo „sunkolektiloj”. Eble estus utile aldoni, ke por tia instalado oni bezonas laboristojn kun kvalifiko pri elektro, tubomuntado kaj tegmento!

Pierre Grollemund
Francio

Praloĝantoj de Esperantujo

En la dorsa kovrilo de MONATO de oktobro mi legas, ke „blankaj setlantoj ignoras la rajtojn de la aborigenoj”. Tio estas nenio kompare kun la fakto, ke diverskoloraj ekloĝantoj en la redaktejo de MONATO ignoras la rajtojn de la praloĝantoj de Esperantujo paroli en bona lingvo.

Renato Corsetti
Italio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualizaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



Donackupono

Donaco por via korespondamiko?

Donaco por la amikoj de Pasporta Servo
kiuj tiel afable gastigis vin?

Donaco por merita ano de Esperanto-klubo?

Jen ideala estas la **Donackupono** de MONATO! Facile kaj malmultekoste sendebla per poŝto aŭ transdonebla en luksa koverto. Donaco ĉiam utila por ne-abonantoj kaj por jamabonantoj.

Ekzistas tri versioj:

- 1) La kupono de **12,50 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **3-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **5-monatan** abonon al la reta.
- 2) La kupono de **25,00 eŭroj**, kiu rajtigas al la ricevinto **6-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **10-monatan** abonon al la reta.
- 3) La kupono de **50 eŭroj** kiu rajtigas al la ricevinto **12-monatan** abonon al la magazina versio de MONATO, aŭ **20-monatan** abonon al la reta.

Mendu vian MONATO-donackuponon nun ĉe
MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,
Belgio aŭ rete ĉe **monato@fel.esperanto.be**.

Grincantaj genuoj ... kaj ĝentileco

Paul GUBBINS

Antaŭ kelkaj semajnoj mi trajnis al renkontiĝo – esperanta – en apuda urbo. Aŭ, pli ĝuste, mi tien vagonis: la „trajno“ konsistis el nur unuvagona veturilo (dizelmotora subplanke inter la boĝioj). Tiel la privatigitaj, do ne plu britŝtataj (sed jes interalie germanŝtataj) naciaj fervojoj provas ŝpari monon, kreskigi profitojn, kaj ĉiel suferigi pasaĝerojn.

Suferigi pasaĝerojn: mi ne troigas. La unuvagona „trajno“ plenplenis: estis sabato, familioj kun infanoj vizitis parencojn, virinoj iris butikumi, viroj survojis al futbalmatĉoj. Kiam la vagono – duonhoron malfrue – finfine algraŭlis al mia stacidomo, ne plu vakis sidlokoj. Mi, kun dekoj da aliaj viktimoj, estis devigita stari.

Nu, ĝenerale ne ĝenas stari. Fakte mi preferas stari ol sidi. Kun plezuro mi memoras el miaj studentaj tagoj la t.n. starlokojn en la malantaŭa parto de teatroj, kie eblis kontraŭ malalta prezo paŝi tien kaj reen, spekti la scenejon de diversaj vidpunktoj kaj, kiam venis la paŭzo, ĉiam atingi unua la bierejon.

Tamen nun, ankoraŭ studanto sed ne plu studento, mi, grizbarbulo, atingis aĝon, kiam fojfoje flustras grince la genuoj, ke plaĉos al ili ne plu porti la pezon de tro da biero kaj maltro da ekzerco kaj iom – side – ripozi.

Samtempe ensaltas la cerbon scenoj el la infanaĝo, kiam, kunsidante en aŭtobuso kun mia patrino, mi aŭdis la nepre obeendajn vortojn: „Jen plenkreskulo, sen sidloko. Ekstaru, cedu ... tiu havu vian.“

Sed tia ĝentileco de la 1950aj jaroj ŝajne malaperis. Certe ĝi ne videblis en la plenŝtopita trajneto, en kiu ni, dupieduloj, veturaĉis kun malpli da spaco, malpli da bazaj komfortoj, ol kvarpieduloj protektataj de diversaj

bestorajtaj leĝoj.

Kaj do sidlokojn okupis infanoj, dum neniu gepatro proponis, ke ĝia idaro donu sian seĝon al mi, aŭ alia staranto, eĉ ne al sinjorino kun bastono kaj pluraj sakoj kaj pakaĵoj.

Kion fari? Eble mi estus devinta peti, ke infano rezignu pri sia sidloko favore, se ne al mi, do al la kompatinda sinjorino kun la bastono. Sed ne. Pli facile suferi ol, kiel ni britoj diras, „kaŭzi scenon“. Scenon, kiu riskus esti sakrojn, insultojn; komentojn kiel: „Mi pagis bileton por miaj infanoj. Ili rajtas tie sidi. Se vi dezirus sidlokon, vi entrajniĝus pli frue.“ Kaj tiel eĉ pli akre plu.

Cetere, estante brito de difinita aĝo, difinita socia tavolo, mi ne plendas. Mi ne ekscitiĝas. Mi ne emociiĝas. Mi flegmas, aplikante ĉiujn stereotipojn – malvarman sangon, superan lipon rigidan – rilate miajn samlandanojn. Galon verŝis mi, nenia heroo, ne

super miajn sidantajn kunveturantojn sed, vidu, jen, kovarde, en la paĝojn de MONATO.

Imagu, do, kiom mi surpriziĝis, kiam la sekvan tagon, reveninte kunpremita kiel enskatoligita sardino, mi legis en dimanĉa ĵurnalo, ke, laŭ enketo entreprenita de iu Fondaĵo Young [jang], ni britoj publike pli ĝentile, pli ĝentilemane, kondutas ol multaj aliaj nacioj. Krome nia konduto, ŝajne, plurrilate pli bonas ol antaŭ kelkaj jaroj.

Kio? Pa! Mi povas diri nur, ke la Young-enketistoj ne kunveturis kun mi en sardino-vagono, en kiu ĉiuj infanoj aŭ dekelkjarulaj postaĵoj estas algluitaj al siaj sidlokoj. Kaj, se veras, ke la publika konduto de la britoj ja superas tiun en multaj aliaj landoj, mi ne scias, ĉu mi volas estontece forlasi mian patrujon por esti elmetata al malĝentileco eĉ pli abomeninda ol en Britio.

Tamen eble la raporto, kiun mi legis en la dimanĉa ĵurnalo, estas iom sensacia, iom troigita. Mi prefere fidu miajn okulojn (aŭ mian genuo-grincadon) por konvinkiĝi, malgraŭ la Young-enketo, ke ĝentileco malaperis ja kun vaporlokomotivoj, do antaŭ jardekoj. Klare: ne ĉion oni kredu, kion oni legas en la gazetaro.

Krom, evidente, kion oni legas en MONATO. ■



Viziuloj: iru kuracisten

Kiam eŭropaj ŝtatoj enkondukis komunan valuton, la eŭron, estis konsentite, ke tio ne signifas ekonomian union. Ĉiu ŝtato plue respondecu pri sia propra ekonomio, do – klare dirite – pri siaj ŝuldoj. Intertempe evidentiĝis, ke kelkaj ŝtatoj antaŭe kaj dume amasiĝis tiom da ŝuldoj, ke ili apenaŭ povas mem repagi ilin.

En la ordinara civitana vivo tion oni nomas krimo, sed ja temas pri ŝtatoj. Kaj evidentiĝis, ke la ceteraj eŭranoj ne povas facile argumenti per la neekzistanta ekonomia unio, trankvile lasante la ŝuldemulojn solaj kun iliaj deficitaj.

La t.n. merkato, pli vere la mond-pintaj spekulaciantoj per monegoj nehavataj, maltrankviliĝis kaj postulis per absurdaj skuoj de la borso reagon de la

pli fortaj eŭromembroj. Inter tiuj estas konsiderataj bonhavaj precipe Francio kaj Germanio, tamen mem kun propraj financaj problemoj.

Ŝuldoj

Kiam al tiuj du multaj el la cetero volis ŝovi la ŝuldojn de Grekio (pli ol 300 miliardojn da eŭroj), la franca prezidanto Sarkozy kaj la germana kanceliero Merkel devis interkonsiliĝi. Transpreni senkompense la ŝuldojn de iu aŭ eĉ pluraj eŭromembroj estas serioza afero kaj postulas klaran vidon inter la politikaj kaj ekonomiaj intrigoj. Bonaj konsiloj estas bonvenaj fronte al tiel giganta, apenaŭ regebla ĝangalo.

En tiu ĉi situacio la prezidanto de la

Monda Banko, Robert Zoellick, aŭdigis sin. Strange, li ne vipis la enormajn ŝuldojn de Grekio, nek ties senefikan ekonomian sistemon, funkciantan nur per ŝuldoj, ne la kaŝemon, la trukojn, la mensogojn de la tieaj registaroj.

Koncepto

Ne, li riproĉis la konduton de la germana registaro, aparte tiun de la kanceliero Merkel mem, en la greka ŝuldokrizo. Li esprimis sin tiel: „Al Eŭropo mankas koncepto. Kiam antaŭ 20 jaroj dissolviĝis la Orienta Bloko, la germana kanceliero Kohl prezentis vizon, kiel la eventoj povus plue disvolviĝi. Aktuale similaĵo plene mankas.”

Ke Zoellick rekte mencias Kohl por denunci kiel senvizian ties iaman politikan lernantinon Merkel, mirigas ne nur germanajn konantojn de la historio. Ja estis tiu Kohl, kiu asertis pagi la rekondukon de la orienta Germanio en la okcidentan „el la poŝtmarkkaso”, kiu promesis „florantajn pejzaĝojn” oriente.

Vivnivelo

Jes, parte ili floras, sed ne pro la vizio de Kohl, sed pere de la konsiderinda monfluo orienten kun prema reduktiĝo de la okcident-germana vivnivelo. Kie la pejzaĝoj ankoraŭ ne videble floras laŭ la pretendoj kaj postuloj, oni senhonte elektas balote la iamajn kaj novajn komunistojn.

Kaj „solidara kontribuo”, t.e. aparta deviga imposto por la iama Germana Demokrata Respubliko, eĉ post 20 jaroj ne ĉesis, sed leĝe daŭras ĝis iam ajn. Pagi vizion per aliulaj monujoj – ĉu inda afero? Ĉu tia estu la vizio pri la estonta Eŭropa Unio? Alia renoma germana kanceliero, Helmut Schmidt, iam konstatis: „Kiu havas viziojn, prefere tuj iru al kuracisto.”

Tamen, pli kunligita Eŭropo certe iam ekzistos. Tamen aktuale ĝi ne bezonas viziojn, sed seriozon kaj sincerajn, realismajn, fidindajn politikistojn – kaj popolojn.

Franz-Georg RÖSSLER



Transpreni senkompense la ŝuldojn de iu aŭ eĉ pluraj eŭromembroj estas serioza afero kaj postulas klaran vidon inter la politikaj kaj ekonomiaj intrigoj.

Platformo por reformo



En oktobro la elektantaro konfirmis la ĉefministrecon de Donald Tusk.

La unuan fojon en la nuntempa historio de Pollando okazis, ke la sama politika partio venkis en du sinsekvaj parlamentaj balotoj.

En oktobro la elektantaro konfirmis la ĉefministrecon de Donald Tusk. Lia partio, la modera Civitana Platformo, ricevis la plej multajn voĉojn (39,18 %).

Verŝajne daŭros la registara koalicio kun la agrikulturisma Pola Popola Partio (8,36 %), tamen tio ankoraŭ ne certas. Lige kun la prezidanteco de Pollando en la Konsilio de Eŭropa Unio, Tusk volas krei novan registaron.

Katolikoj

En Pollando estas videbla trankviliĝo. Multaj homoj subtenis Civitanan Platformon por malebligi venkon de la katolika-naciisma partio Juro kaj Justeco (29,89 %). Tiu ĝuas altan subtenon precipe inter homoj maljunaj kaj katolikoj forte kredantaj.

La plej granda ŝoko de tiuj ĉi balotoj estas tamen ŝanĝo ĉe la maldekstra flanko. En la parlamenton neatendite eniris nova partio, la liberala Movado de Palikot (10,02 %). Ĝi estis kreita antaŭ kelkaj monatoj de Janusz Palikot – riĉulo, eksa entreprenisto kaj ĝis la 10a de januaro 2011, kiam li rezignis pri sia parlamenta mandato, deputito reprezentanta Civitanan Platformon.

Alianco

Malgraŭ ekonomie liberala programo, li prezentis sian partion kiel maldekstran movadon, tiamaniere forprenante multe da voĉoj de Alianco de Demokrata Maldekstrularo (8,24 %). Tiel AdDM eniras la parlamenton kun la malplej bona rezulto ekde sia fondiĝo.

Lige kun tio, ke Movado de Palikot fariĝis la tria forto en la pola politiko, oni antaŭvidas sociajn ŝanĝojn en la konservativa Pollando. En ties programo troviĝas i.a. laŭleĝigo de la tiel nomataj malfortaj drogoj, enkonduko de registrita partnereco, ĉesigo de instruado de religio en lernejoj kaj liberaligo de la leĝo pri abortigo.

La unuan fojon en la pola parlamento membroj malkaŝa gejo kaj transsekso, ambaŭ elektitaj per la balotlistoj de Movado.

Paweł FISCHER-KOTOWSKI

Homaj rajtoj enfokusigitaj

Filmoj malpermesitaj estas inter tiuj surekranigitaj dum internacia festivalo en Tirano, Albanio, dediĉita al homaj rajtoj. Spekteblis ankaŭ filmoj pri hororoj de konfliktoj en la nuna mondo.

La festivalo, okazinta fine de septembro, eniris sian kvinan jaron. Ĝin finance subtenas interalie la urbodomo de Tirano, diversaj eksterlandaj ambasadejoj kaj Eŭropa Unio. Partoprenis 14 landoj, kaj videblis 36 filmoj.

Almenaŭ ses prezentis dolorigajn scenojn pri militoj kaj masakroj, pri etna kaj religia maltoleremo, pri infanoj venditaj kaj virinoj perfortitaj. Ili ĉiuj starigis demandojn pri moralaj, etikaj kaj spiritalaj valoroj.

En la spektantaro sidis gejunuloj, kiuj poste diskutis la problemojn pri homaj rajtoj, kiujn prezentis la filmoj.

Bardhyl SELIMI

MONATO en Facebook

Kiu anas en la socia retservo *Facebook* povas senpage ricevi mallongajn informojn pri MONATO.

Sufiĉas iri al la adreso **eo-eo.facebook.com/revuo.Monato** kaj alklaki supre la ligilon **Ŝati**.

La mesaĝoj de MONATO ekde tiam aperos en via novaĵlisto.

BRAZILIO

Programo prokrastata



La eksprezidanto Lula da Silva havas laringan tumoron.

Fine de oktobro reeĥiĝis en la brazila gazetaro la diagnozo, ke eksprezidanto Lula da Silva havas laringan tumoron. La nepra paŭzo por kuracado prokrastos la sociajn kaj politikajn de-

vojn de lia ŝtopita agendo.

Malgraŭ la fakto, ke Lula eksiĝis kiel respublikestro, almenaŭ du taskoj devigis lin plu labori. Laŭ deklaro de lia edzino, tiel oftaj estas la nunaj devoj de

Lula, ke la eksa prezidanto jam vojaĝas pli ol la iama prezidanto.

La unua tasko estas sekvo de lia populareco. Dekoj da universitatoj atendas lin por esprimi per honora doktora titolo rekonon de la socialaj kaj politikaj atingoj.

Urbestro

La alia enkadriĝas en la enlanda politiko. Li estas la kunordiganto de la kampanjo de Fernando Haddad (ministro pri klerigado) kiel kandidato de la Laborista Partio por la posteno de urbestro de San-Paŭlo, la plej granda urbo de Brazilo. La balotado en San-Paŭlo funkcias kiel politika orakolo por la tuta lando.

Lula da Silva ordinare ĝuas kontentigan sanstaton. Fojfoje li alfrontis dikecon. Tamen li estas fumanto kaj nun trafis lin kancero, kies kuracado postulos iom pli ol simpla dieto. Nun la eksprezidanto fariĝu eksfumanto, kaj samtempe fermu plenplenan agendon kaj preparu sin por pacience lukti kontraŭ kancero.

Jozefo LEJE

SLOVAKIO

Stabiligo – kaj malstabiligo

Disfalis la slovak kabineto de Iveta Radičová [rádičová]. Kaŭzo: la parlamento rifuzis en oktobro la pligrandigon de la Eŭropa Fonduso por Stabiligo Financa (www.efsf.europa.eu).

La fonduso estis kreita en majo 2010 por stabiligi tiujn eŭrozonajn ŝtatojn, kies ekonomioj spertas gravajn financajn problemojn.

Radičová kunligis baloton pri la fon-

duso kun konfido-baloto pri la regado de Slovakio. Tamen favore al la fonduso kaj la ministraro voĉdonis nur 55 el 124 ĉeestantaj parlamentanoj (el 150-membra ĉambro).

Kondiĉo

Tial la parlamento pridiskutis antaŭtempan tutlandan baloton en marto de la venonta jaro. Jen fundamenta

kondiĉo de la ĉefa opozicia partio SMER. Poste ĝi konsentis voĉdoni por pligrandigi la fonduson de 440 al 780 miliardoj da eŭroj.

Post dialogoj inter la koalicio kaj opozicio la parlamento aprobis konstitucian leĝon pri antaŭtempa parlamenta baloto kaj tuj poste voĉdonis pri la fonduso. Intertempe Radičová restas kabinestrino.

Julius HAUSER

Post virinoj – viro

Post sukcesa prezidanteco de du virinoj Irlando refoje havas viran prezidanton, nome Michael D. Higgins (irlandgale: Mícheál Ó hUiginn).

Li ricevis pli ol milionon da voĉoj – la plej grandan nombron iam akiritan de prezidanto-kandidato en la historio de la moderna nacio. Tiele Higgins iĝas la 9a prezidanto de la Respubliko.


Senprecedenca nombro da kandidatoj (sep) prezentis sin por la elekto, kiu okazis la 27an de oktobro. La kampanjo estis intensa kaj iufoje iom amara, kvankam Higgins mem ĉiam agis digne kaj gentile.

Kandidatoj

Inter la aliaj kandidatoj estis Seán Gallagher [ŝon galahr], entreprenisto kaj antaŭa fondusa organizanto por la partio *Fianna Fáil* (kiu grandparte, kun

la bankoj, kontribuis al la kolapso de la irlanda ekonomio); Martin McGuinness [martn mkgines], antaŭa gvidanto de la neleĝa irlanda respublikisma partio IRA, sed nun vicĉefministro en la nord-irlanda asembleo; Mary Davis [mejri dejvis], organizanto de t.n. Specialaj (Handikapulaj) Olimpiaj Ludoj; kaj Dana Rosemary Scallon [rozmary skaln], antaŭa membro de la Eŭropa Parlamento, kiu kiel 18-jara knabino gajnis en 1970 por Irlando la Eŭrovido-Kantokonkurson.

La nova prezidanto sendube estis elektita pro avantaĝoj, kiujn li posedas super la aliaj kandidatoj. Li estas respektata kiel saĝulo, poeto, intelektulo, subtenanto de kulturo kaj artoj, senatano kaj defendanto de malavantaĝuloj. Inter la kandidatoj li estas la sola, kiu elokvente kaj egale flue parolas la du oficialajn lingvojn de Irlando.



Higgins naskiĝis en Limeriko en 1941. Dufoje li estis urbestro de Galivo (Galway). Li estis elektita al la irlanda parlamento en 1981. Inter 1993 kaj 1997 li estis ministro pri la gaelparolantaj regionoj kaj la kulturo. En tiu periodo li refondis la Irlandan Filmkomisionon kaj establis la gaellingvan televidservon.

Garvan MAKAJ



Post sukcesa prezidanteco de du virinoj Irlando refoje havas viran prezidanton, nome Michael D. Higgins (irlandgale: Mícheál Ó hUiginn).

Murdoj memorigitaj



Hamza Kazazi, filo de unu el tiuj pafmortigitaj post la kolapso de la postriba ribelo, parolas pri sia patro.

La 9an de septembro oni memorigis per solenaĵo en Tirano, Albanio, la 65an datrevenon de la kontraŭkomunista ribelo de Postriba, verŝajne la unua tia en orienta Eŭropo post la dua mondmilito.

Pro tio, ke la sekurecaj servoj anticipis la ribelon, kaj pro la interveno de la jugoslavia armeo (tiam Albanio kaj Jugoslavio estis intimaj amikoj), la ribelo kolapsis. Mortpafitaj estis dekoj da

homoj, arestitaj kaj poste kondamnitaj al longdaŭra enkarcerigo 1200 aliaj.

Kelkaj iamaj arestitoj kaj iliaj familianoj partoprenis la solenaĵon, kune kun politikistoj kaj aliaj eminentuloj.

Terorismo

Per videokonferenco parolis el Usono profesoro Sami Repishti, eksa ribelulo. Li substrekis la sangvenĝan instaliĝon de komunismo en Albanio, ties ŝtatan terorismon kaj la sekvan rezistadon flanke de patriotoj, kontraŭkomunistoj kaj intelektuloj.

La politikaj ŝanĝoj en 1990-1991 estiĝis sensange kaj senvenĝe, sed, aldonis Repishti, la ŝtatpotencon ankoraŭ posedas eksaj komunistoj kaj ties posteuloj. Ĉi-lastaj pliriĉiĝas ekonomie kaj politike plifortiĝas ĉirkaŭ maldekstraj partioj.

Estas ĝuste tiuj partioj, laŭ Repishti, kiuj jam de pluraj jaroj blokas en la albana parlamento reformojn necesajn por aligi la landon al EU.

Reĝimo

Eksaj persekutitoj kaj ties gefiloj ŝokiĝas – tiel Repishti – kiam ili renkontas en ŝtataj oficejoj, en la parlamento, siajn iamajn persekutintojn. Ekzemple la ĉefo de la socialistaj deputitoj estas eksa ministro pri internaj aferoj. Aliaj deputitoj aŭ eĉ ministroj estas gefiloj de eksaj altranguloj de la komunisma reĝimo.

Cetere la eksaj ĉefkomunistoj (ekzemple la lasta diktatoro, Ramiz Alia, kaj la vidvino de la diktatoro dum 46 jaroj, Enver Hoxha, se ne menciis centojn da aliaj) ankoraŭ ne pardonpetis pro la krimoj de la tiama reĝimo.

En Albanio, atentigis Repishti, oni ankoraŭ ne hontas pro la nomo „komunisto”, kontraste al Italio aŭ Germanio rilate „faŝisto” aŭ „nazio”.

En la Nacia Historia Muzeo, kie okazis la solenaĵo, ekzistas ekde pluraj jaroj pavilono pri la genocido komunista. Ĝi estas ege vizitata ankaŭ de alilandaj turistoj.

Bardhyl SELIMI

VETERO

Soifas ne nur homoj ...

En la usona Teksaso oni longe memoros la ĉi-someran varmegon. Dum 40 tagoj la maksimuma aertemperaturo senĉese superis 37,8°C. La varmo-rekordo tamen ne estis rompita. En 1980 varmego tia daŭris 42 tagojn.

Senpluva seka vetero kreas diversajn problemojn por bredistoj kaj terkultivistoj. Sendube suferos la ĉi-jara vinrikol-

to. Ankaŭ fiŝkaptado: plisaliĝas riveroj, dum la kvanto de ostroj kaptitaj en Meksika Golfo abrupte ŝrumpis.

Mizera

Do la nuna sezono estas eble la plej mizera por la 217-miliondolaro ostro-industrio. En Teksaso kaj Luiziano estas kaptitaj por la usona merkato 70 % de tiuj ĉi marbestetoj. Ankaŭ salikokoj es-

tas same trafitaĵ.

Aliflanke sekeco havas siajn bonajn flankojn. Perditaj, ŝajne, estas mariĥuano-plantoj kultivitaj de meksikaj narkotaĵo-karteloj. Ĉiu planto bezonas ĉiutage kvar litrojn da akvo. La kartelistoj devas elpensi diversajn metodojn por akvumi sian stokon. Tial policianoj pli rapide ilin trovas.

AMik



Sanige ... kaj sensukere

WIKIPEDIA.ORG



Karobo, alloga por tiuj, kiuj volas sekvi sanigan vivstilon, ne rezignante pri bonaj saporoj.

Apetitoveka intermanĝeto, samtempe bongusta kaj sanefika: tiu ekzistas ne nur en la revoj de prodietaj frustraciitoj, sed ankaŭ estas firmiĝinta realo en Kipro, unu el la plej grandaj insuloj de Mediteraneo.

Temas pri la karobo, frukto preskaŭ forgesita aliloke, sed unu el la plej tipaj produktaĵoj de Kipro. Ĝi estas aparte nutra manĝaĵo, trioble pli riĉa je kalcio ol lakto. 100 gramoj da karobo entenas 350 miligramojn da kalcio, dum la sama kvanto de lakto enhavas nur 120.

Krom tio, karoboj estas riĉaj je proteinoj (4 %), karbonhidratoj (63 %), fosforo (80 miligramoj en 100 gramoj), vitaminoj A, D, B1, B2 kaj B3, fero, natrio kaj aliaj bonefikaj mineralaj saloj.

Dolĉigiloj

En la nuntempo, sukero „regas” senrivalo ĉe la plimulto de la pretaj manĝaĵoj, apud aliaj dolĉigiloj (aspartamo, sakarino, ciklamato), pri kies saneco oni multe diskutas. Iam tamen oni konsideris karobon unu el la plej sanigaj naturaj dolĉigiloj.

Karobo estas konata ankaŭ kiel „pano” de Johano la Baptisto, kiu sin nutradis per ĝi. Cetere, karoboj plutenis vivanta ankaŭ la „erarantan filon” de la

samnoma evangelia parabolo.

En la tempoj de la hispana interci-vitana milito, oni donadis karobojn al infanoj por manĝi, dum en Grekio, en la epoko de la dua mondmilito kaj de la germana okupado, armeanoj, kamparanoj kaj ĉevaloj travivis danke al ĉi tiu, ŝajne tiel altvalora, donaco de la naturo.

Plantejoj

Karobo estas tradicia produktaĵo en pluraj mediteraneaj landoj, sed ĝi trovis plej favoran grundon en Kipro. Tie karoboj ne kreskas en organizitaj plantejoj, sed spontane aperas tie kaj tie kiel sovaĝaj, centjaraj arboj. La kipra kalkoŝtona grundo siaflanke favoras la arbojn, donante al ties fruktoj aparte plaĉan guston. Pro tio, la kipra karobo estas tiel renoma kaj ŝatata en la internacia merkato.

Nekredeblas, kiom da kipraj manĝaĵoj enhavas karobon. Ekzemple, *ĥarupomelo*: temas ne pri karobomielo (kion laŭlitere signifas la vorto en la novgreka), sed pri siropo kun propraĵo sanefika por la stomako kaj adstringa

por la intesto. Ĝi utiligeblas, anstataŭ sukero, en la preparado de dolĉaĵoj kaj varmaj trinkaĵoj.

Tiom pli „eklektika” estas la t.n. *ĥarupóskoni*, karobopulvoro, kiu tre bone anstataŭas kakaon kaj sukeron en kia ajn recepto: biskvitoj, tortoj, truflaciaĵoj ktp. Ties saporo treege similas al tiu de ĉokolado, kio ebligas uzi ĝin por prepari varman trinkaĵon aŭ eĉ frostan kirlaĵon.

Alkoholo

La fruktoj de la karoboarbo ebligas produkti ankaŭ karobobrikojn tute similajn al la ĉie vendataj ĉokoladobrikoj, draĝeojn (el karobsiropo kaj amandoj) kaj, se plaĉas io pli forta, tradicion kipran karoblikvoron, enhavantan 17 % da alkoholo.

Rimarkindas, ke ĉiu el la menciitaj produktaĵoj ne antaŭvidas aldonon de sukero aŭ konserviloj, kio igas ilin des pli allogaj por tiuj, kiuj volas sekvi sanigan vivstilon, sen rezigni pri bonaj saporoj.

Roberto PIGRO



Karobo estas tradicia produktaĵo en pluraj mediteraneaj landoj, sed ĝi trovis plej favoran grundon en Kipro.

Kie la kulpo?

Miaj leteramikoj, loĝantaj en aliaj landoj, ne komprenas, kio okazas en landoj, kiel Bulgario, Hungario aŭ Rumanio, kiam ili legas pri ekapero kaj fiagoj de rasismaj grupoj kaj partioj – vere bedaŭrinda, kondamninda kaj eĉ timiga fenomeno.

Ĉu oni freneziĝis, balotante por rasismaj partioj? Ĉu la loĝantaro de tiuj landoj iun tagon vekiĝis kun malamego kontraŭ, ekzemple, ciganoj? Kio okazas?

Mi ne neas, ke ekzistas tiuj, kiuj malamegas t.n. fremdulojn: ciganojn, judojn, etnajn minoritatojn k.s. Homoj, kiuj tiel malamas, estas tamen laŭ mi nur malplimulto. Kial tamen ŝajnas, ke la socio fariĝas ekstremisma?

Murdoj

Antaŭ nelonge en Bulgario okazis perfortaj manifestacioj kontraŭ ciganoj. La kialo: la murdo de 19-jara bulgara judo fare de anoj de cigana klano.

En Hungario en 2009 ciganoj murdis rumanan manpilkiston en publika amuzejo, ŝajne nur por montri sian superecon.

La sportisto estis senkulpa, amata de

siaj kamaradoj kaj de la tuta urbo, en kiu li loĝis.

Lastatempe en Rumanio okazis io simila. Usona korbopilisto Chauncey Hardy, sportisto en la rumana urbo Giurgiu, estis linĉita de anoj de cigana klano en amuzejo, kie li festis kun kamaradoj venkon en sportludo.

Sportisto

Hardy venis en Rumanion por gajni monon, monate 1500 dolarojn, el kiuj li sendis al malriĉaj familianoj en Usono 1000 dolarojn. Temis denove pri populara sportisto.

La murdinto deklaris, en la ĉeesto de sia advokato, ke li koleriĝis pro tio, ke la sportisto ne parolis rumane. Verŝajne tio estas preteksto por lin ataki.

La prestiĝa rumana gazeto *Adevărul* (La vero) raportis, ke protektas tiujn cigano-klanojn iuj politikistoj. Ili scias, ke bonaj rilatoj kun tiuj mafiaj klanoj bonvenas, kiam temas pri balotado.

Indiferenteco

La loĝantaro seniluziiĝas pri politi-

kistoj, kaj do kreskas dum elektoj indiferenteco. La politikistoj povas tamen rikolti voĉojn inter la bone organizitaj klanoj kun multaj membroj: subtenon tian repagas la politikistoj per protektado, eĉ kontraŭleĝa.

El tio fontas kreskanta malamo kontraŭ la ciganoj. La popolo, ankaŭ la polico, timas tiujn klanojn: mankas kuraĝo por ilin denunci okaze de krimoj.

Certe, ne ĉiuj ciganoj estas murdistoj, rabistoj, krimuloj. Tamen la malriĉiganta socio indignas, ke ili deklaras sin „persekutataj”, „diskriminaciitaj”; ke ili postulas monhelpon, decan loĝejon; ke ili ne pripensas, ke vivas multaj neciganaj malriĉuloj, senlaboruloj, kiuj finstudis lerneje, eĉ universitate, kaj ne trovas laborlokon. Ili indignas ankaŭ, ke la ciganoj subvencioj devenas de la poŝtoj de impostpagantoj.

Timo

Jen do la kaŭzo de la malamo. Ĝi restas nur muta malkontento, sed kiam tute senkulpa junulo estas mortigita de membroj de mafiaj klanoj, kreskas malamo miksitita kun timo.

Feliĉe, en Rumanio la popolo ne perfortis kontraŭ la klanoj. Fakte, oni ne kuraĝas: oni obeas la leĝojn. Espe-reble tiuj leĝoj punos la kulpulojn, kiuj tamen ne revivigos la viktimojn.

Honestuloj

Evidente nepras batali kontraŭ rasismo, ankaŭ kontraŭ krimuloj. Se honestuloj timas kulpulojn, se korupteblaj politikistoj protektas krimulojn kaj ne ordinarajn homojn, kiuj obeas al leĝoj, tio nutras malamon.

Oni voĉdonas por fiuloj, kiuj promesas protekti onin kontraŭ t.n. cigana krimado. Verdire la politikistoj volas nur akiri potencon. Kaj do pri la malamo certe ne kulpas sole ciganoj, certe ne ĉiuj ciganoj.

Leĝoj, rajtoj kaj devoj estu egalaj por ĉiuj homoj. Krimuloj estu punataj, sendepende de etna aparteno. Se restos korupto, la situacio eĉ pli malboniĝos.

L. Sz.



Chauncey Hardy (maldekstre), sportisto en la rumana urbo Giurgiu, estis linĉita de ciganoj en amuzejo.

Veturilo „elstara”

Ĉiam pli populariĝas la transporto de turistoj per starveturilo. Ĝi estas unupersona transportilo, produktata ekde 2001 de la firmao *Segway* el Bedford, en la ŝtato Nov-Hampŝiro, Usono.

Starveturilo konsistas el eta plat-formo kun elektra motoro, du flankaj radoj, antaŭa vertikala stango kun horizontala biciklosimila stirilo por ambaŭ manoj. Ties geniaĵo estas la akcelado kaj bremsado, kiuj funkcias per translokado de la korpopezo.

Rapideco

Se oni klinas sin antaŭen, la starveturilo pliigas la rapidecon; se malantaŭen, ĝi haltas aŭ retroiras. La ekvilibron gardas la transportilo mem. Ĝia maksimuma rapideco estas 20 km hore. Plensargita akumulatoro sufiĉas por veturi 40 km.

Turistoj elektas tiun eksterordinaran

transportilon diversele: ekzemple, en Aŭstrio, traŭbe promeni kun ĉiĉerono aŭ ekskursi al vinberejoj. Aparte infanoj tre ŝatas tiel veturi.

Feriejo

Unu el la lokoj, kie oni atendas ŝatantojn de starveturiloj, estas la altmontara feriejo Serfaus, kiu kuŝas je 100 km okcidente de Innsbruck en la aŭstra Tirol. De aprilo ĝis oktobro la urbo Steyr en Supera Aŭstrio proponas diversspecajn tiajn rondveturojn, ekzemple trihoran trarigardon de la mezepoka urboparto.

Estas ofertoj ankaŭ en la ĉefurbo Vieno: veturoj al la Ŝtata Operejo, Burgoĝardeno, imperiestra kastelo Hofburg, parlamentejo, urbodomo kaj al aliaj vidindaĵoj, kiuj troviĝas apud la Ringstrato kaj en la urbocentro.

Evgeni Georgiev



Starveturiloj pli kaj pli videblas en turismaj lokoj.

Boato historia



Miloj da turistoj vizitas la urbon Jiaxing por vidi boaton uzitan de Mao Zedong.

Antaŭ fervojoj kaj aviadiloj boatoj tre gravas en Ĉinio kiel transportiloj. Sed unu boato aparte gravas kaj nuntempe allogas turistojn el la tuta lando.

La boato, el ligno kaj multe riparita, rilatas al la fruaj jaroj de la ĉina komunista partio. En 1921 la partio okazigis sian unuan kunvenon komence en Ŝanhajo. Pro sekureco la partoprenantoj vojaĝis al la urbo Ji-axing kaj daŭrigis la kunvenon ĝuste en tiu boato.

Prezidanto

Sume estis 12 partoprenantoj, kaj unu el ili estis Mao Zedong, la unua prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko. Ĉi-jare la partio celebras la 90an datrevenon de la fondiĝo kaj miloj kaj miloj da partianoj vizitas Ji-axing pro la boato.

Vizaĝe al tiu ĉi historia boato kelkaj vizitantoj sincere kaj laŭte deklaras la devizon de la partio por montri sian estimon kaj amon.

Inter la lastatempaj vizitantoj estas 45 laborantoj de la retrevuo *El Popola Ĉinio*, kiuj faris 1500-kilometran vojaĝon por vidi la boaton.

Xu Jinming/pg

SPORTO

Alloga finalo

Serbio estas la duan fojon (post 2001) eŭropa ĉampiono pri retpilkado por viroj. Ĝi venkis Italion en la finalo je 3:1 ludoj (17:25, 25:20, 25:23, 26:24) en Vieno. En la ĉampionado, kiu okazis en Aŭstrio kaj Ĉeĥio, partoprenis teamoj de 16 landoj.

En la unua ludo de la finalo la italaj retpilkistoj dominis. Per bonega teama koncentriĝo ili ne permesis al la serboj distingiĝi. Ĉi-lastaj atakantoj realigis nur naŭ poentojn el 23 atakoj.

En la konvinke gajnita dua ludo fare de serbaj retpilkistoj estis multe pli da premo en ilia ludado. Pro tio malaperis ĉe la italoj la komence demonstrita precizeco. Ivan Miljković, la kapitano de la serba teamo, traboris nun multe pli bone la italan blokadon.

Dubinda decido

La antaŭdecido okazis en la tria ludo. Post kiam la italoj egaligis 23-23 pro la elstara gvido de ilia kapitano Cristian

Savani, dubinda decido de la ĉefjuĝisto donis eblon al la serboj gajni la ludon.

Tion ili faris helpe de Miloš Terzić, kiu rekte per serviro markis la lastan poenton. En la kvara ludo la itala teamo estis kelkan tempon fronte laŭ poentoj, sed fine denove Terzić per serviro certigis la venkon por Serbio.

Mondpokalo

Pro tiu granda sukceso la serboj fariĝis ĉi-momente la plej bona landa teamo kaj reprezentos kune kun la italoj Eŭropon ĉe la mondpokalo-turniro en Japanio fine de la jaro.

Igor Kolaković, la trejnisto de Serbio, estis tre feliĉa post la matĉo: „Neniu kredis je nia sukceso, ankaŭ en nia patrujo. Ankaŭ ni ne traktis nin kiel favoritojn, ni volis okupi almenaŭ la sesan lokon kaj tiel certigi nian partoprenon en la sekva eŭropa ĉampionado. Ni brave ludis ĉiun matĉon, aparte dum la duonfinalo kontraŭ Rusio. En ĝi ni estis

perfektaj en la defendo. Tio estis nia plej malfacila ludo.”

Seniluziigita

Mauro Berruto, la ĉeftrejnisto de Italio, estis seniluziigita: „Iomete tristaj ni estos kelkajn horojn, tamen la partopreno en la finalo estas por ni granda sukceso. Ni partoprenos en la mondpokalo en Japanio.”

En Vieno antaŭ la finalo okazis la matĉo por tria loko. Pollando, eŭropa ĉampiono ekde 2009, venkis Rusion je 3:1 (25:23, 18:21, 25:21, 25:19). La rusaj retpilkistoj okupis la kvaran lokon same kiel en 2009 en Turkio.

„Ni batalis kuraĝe kaj digne”, diris Andrea Anastasi, la itala ĉeftrejnisto de Pollando. Vladimir Alekno, la ĉeftrejnisto de Rusio, parolis pri merita malvenko: „En la duonfinalo ni ne havis bonŝancon, sed nun ni malgajnis kiel teamo.”

Evgeni GEORGIEV

RUMANIO

Sovaĝa sorto

Post la falo de la komunisma reĝimo en Rumanio ĉesis funkcii ŝtataj agrikulturaj bienoj. Kulti-vistoj rricevis la proprajn grundojn kaj terenojn kaj komencis mem prizorgi la teron.

Ĝenerale la homoj estis malriĉaj kaj uzis ĉevalojn aŭ bovojn en la terkultivado. Poste tiuj, kiuj fariĝis bonhavaj, aĉetis traktoron.

Tamen en multaj vilaĝoj oni uzas eĉ nun ĉevalojn, ne havante monon por aĉeti maŝinojn.

Vagantaj

En pli prosperaj lokoj videblas forlasitaj, vagantaj ĉevaloj, ankaŭ senmastraj hundoj. De tempo al tempo amaskomunikiloj raportas pri la kruela sorto de tiuj bestoj forpelitaj de siaj mastroj.

Ĉi tiun someron oni raportis pri ĉevaloj „sovaĝaj” en la Danubo-delta. La bestojn oni volis fortransporti en mizeraj kondiĉoj al buĉejo. Temis pri 52 ĉevaloj, el kiuj 11 mortis, malgraŭ la helpo de volontuloj, kiuj provis ilin savi.

Protektindaj

Biologoj opinias, ke la ĉevaloj ne estas „sovaĝaj”, nur sovaĝiĝintaj. Ili do ne apartenas al loka ekologia sistemo kaj detruas rarajn, protektindajn plantojn kaj arbojn. Ekzemple vintre, malsategaj, ili rongas la arboŝelojn.

Forlasi dombeston estas leĝe malpermesite. Se la iama mastro estos konata, tiu estas punita. Tamen ofte malfacilas identigi la posedinton.

Entrepreneuraj homoj vidas ŝancon allogi turistojn en regionon, kie vivas ĉ.1500-3000 „sovaĝaj ĉevaloj”. Fakuloj asertas, ke jam de jarcentoj ne ekzistas en Rumanio sovaĝaj ĉevaloj ... kaj la sovaĝiĝintaj bestoj ne estu rezerveje protektataj.

Lenke SZASZ

Telfero super Rejno

En Koblenco okazis la Federacia Ĝardena Ekspozicio 2011 (BUGA). Kiel ĉiam en la ekspozicio oni prezentis ĉiuspecajn ĝardenmodelojn: vilaĝajn, urbajn, kamparanajn, privatajn, publikajn ktp. Tamen ne nur la aktuala stato de la plantoj allogis la vizitantojn el Germanio kaj el la najbaraj landoj, sed ankaŭ allogaj programeroj, en kiuj elpaŝis bildartistoj, muzikistoj, teatristoj kaj aliaj fakuloj.

Kadre de la ĝardena ekspozicio la urbo proponis siajn tradiciajn vidindaĵojn: la pompa kastelo kun sia granda parko, la „Germana Angulo” kun la monumentego pri la rajdanta imperiestro Vilhelmo la Unua (pliampleksigita okaze de la ekspozicio per la nove aranĝita „florkorto” ĉirkaŭe) kaj la nun muzeo funkcia iama fortikaĵo Ehrenbreitstein (Honorlarĝŝtono), situanta

aliflanke de Rejno kun apuda spaco por vastaj ĝardenaĵoj.

Problemo

Sed ekestis problemo, kiu tamen fariĝis apartaĵo de tiu ĉi ekspozicio: Kiel ligi la urbajn vizitindejojn kun la transrejna areo, kiu en la proksimeco oportune proponas aŭtoparkejojn por la aŭtoamasoj, mankantajn en la urbocentro mem? Ĉu busoj trans ponton aŭ pramoj trans la riveron kapablas veturigi kontentige la konstantan homfluon? Ne, oni solvis la problemon per pli ekscita rimedo. Ĉar la fortikaĵo situas alte montodorse, oni konstruigis telferon fare de la renoma aŭstra firmao *Doppelmayr*, kiu havas preskaŭ monopolon en la Alpoj. Eĉ homvicoj ne devis longe atendi pro la bone ekipita, ĉiurilate taŭga transportilo. La tel-



RITA ROSSLER-BÜCKEL

Vespere veturi per la telfero.

fero estis la sekreta allogaĵo, kiun ĝuis preskaŭ ĉiuj floramantoj.

„Nenatura”

Speciale kreita kaj permesita nur por la Federacia Ĝardena Ekspozicio 2011, la telfero rajtas funkcii almenaŭ du pliajn jarojn. Poste oni devos denove pripensi, ĉu ĝi ĝenus la etoson de la „romantika” rejna valo, aŭ ĉu respondeculoj de la „Monda Kulturheredaĵo” minacus nuligi la honorigan kaj turistojn allogantan titolon „Mondheredaĵo”. Pro la „nenatura” telfero, cetere troviĝanta tuj apud aŭtoŝoseoj, trajnreloj, ŝipkanalo, atomcentral-kamentubo, elektrokabloj, aviadilvojoj ktp, kiuj estas senproteste tolerataj. Kiel ajn, ankaŭ post la oficiala BUGA oni povos ĝui la telferon super Rejno.

Franz-Georg RÖSSLER



RITA ROSSLER-BÜCKEL

Telferaj gondoloj super Rejno.

„Princo Igor” neniam aŭdita

La 1an de aprilo 2011 okazis la monda premiero de la opero *Princo Igor* de la fama rusa komponisto A. P. Borodin (1833-1887). Jes, ĝuste la premiero, ĉar unuafoje estis prezentita la aŭtora versio de la bone konata opero. La komponisto laboris super la verko 18 jarojn, sed mortis, ne fininte ĝin.

Konata versio

Post la morto de A. P. Borodin la operon finverkis kaj orkestris aliaj konataj komponistoj, N. A. Rimskij-Korsakov kaj A. K. Glazunov. Ilia partituro estis eldonita en 1887-1890, kaj jam 120 jarojn la tuta mondo konas la operon ĝuste en tiu versio. *Princo Igor* estas unu el la plej ŝatataj rusaj operoj, sed proksimume kvarono de ĝia nuna muziko ne apartenas al la aŭtoro mem. N. A. Rimskij-Korsakov kaj A. K. Glazunov reverkis la operon, ŝanĝante la

koncepton kaj forigante plurajn erojn. La tria akto estis preskaŭ komplete verkita de A. K. Glazunov.

Nekonata versio

Tamen ankoraŭ en 1947, en la jaro de la 60a datreveno de la morto de la komponisto, la sovetia muzik-fakulo P. A. Lamm rekonstruis la aŭtoran version de la opero, kolektante kaj prilaborante 77 manuskriptojn de A. P. Borodin. Li preparis grandan universalan partituron, enhavantan ĉiujn muzikpecojn de la aŭtoro kaj la finverkintoj. Bedaŭrinde, la rezultoj de lia laboro ne estis publikigitaj.

Al la materialoj de P. A. Lamm turnis sin la muzik-spertulo A. V. Buličova dum la preparo de la ĉi-jara prezento de la opero. Ŝi esploris la aŭtoran pianadaptajon de la opero, fragmentojn de la partituro de P. A. Lamm kaj aliajn

unikajn materialojn, konservatajn en la moskva Muzeo de la Muzikkulturo, kaj eltiris ĉirkaŭ 6000 taktojn de la muziko de A. P. mem. Evidentiĝis (pro konsideroj pri la tonaloj kaj muzika strukturo de la aktoj), ke la ordo de la oper-pecoj en la versio de N. A. Rimskij-Korsakov kaj A. K. Glazunov ne estas ĝusta.

Multaj homoj kredas, ke post la morto de A. P. Borodin restis aro de disaj oper-eroj. Tamen fakte la komponisto finverkis ĉiujn aktojn, krom la tria kaj la uverturo. Plie, A. P. Borodin ĉiam verkis grandajn pecojn, ne apartajn erojn. Haveblas planoj de la komponisto, kaj estas konate, ke li ĉiam laboris sinsekve de la komenco ĝis la fino. A. V. Buličova trovis la ĝustan ordon de eroj kun, kiel ŝi diras, „granda probable”. Duboj koncernas nur la ariojn de la princo Igor kaj la finalon. Eble oni solvos tiujn problemojn, se estos trovita



A. P. Borodin



N. A. Rimskij-Korsakov



A. K. Glazunov



La opero *Princo Igor* de la fama rusa komponisto A. P. Borodin inspiras multajn artistojn.

la aŭtoro pian-adaptaĵo de du aktoj de la opero, pri kiu P. A. Lamm skribis, ke li vidis ĝin en biblioteko pli frue, sed jam ne povis trovi dum la laboro super la opero.

En la nova versio estis forigitaj ĉirkaŭ 1700 taktoj, verkitaj de N. A. Rimskij-Korsakov kaj A. K. Glazunov, kaj inter kelkaj aŭtoraj variantoj de la sama peco estis ĉiufaje elektita la plej lasta. Estis aldonitaj kelkaj eroj, forigitaj dum la redaktado. La operpecoj sekvas en la rekonstruita ordo. Estas interese, ke en la aŭtoro versio riveligis aliaj akcentoj, ekzemple pri la danĝero de ne nur eksteraj, sed ankaŭ internaj malamikoj.

Multaj konataj pecoj en la nova versio sonas nekutime por la aŭskultantoj. La novaj partoj ankaŭ estas defio por solistoj, ja ili same al kutimiĝis al la ekzistanta versio.

Alia rekonstruo

La nove preparitan aŭtoran version prezentis solistoj de la moskva teatro *Gelikon-opera* (Helikon-opero) en la Moskva Internacia Muzikdomo. Bedaŭrinde tio estis nur tiel nomata koncerta prezento, sen dekoracioj kaj kostumoj. La teatro planis malfermi per tiu ĉi premiero sian novan scenejon, sed aperis problemoj pri la konstruaĵo.

La teatro havas ejon en historia parto de Moskvo kaj oni intencis larĝigi ĝin per apudaj konstruaĵoj. Estis ricevita speciala permeso de moskvaj instancoj, ĉar la konstruaĵoj estas parto de la historia urb-bieno de la princino Ŝaĥovskaja-Glebova-Streŝneva. Fakte, temis pri restaŭro kaj rekonstruo de la interna korto de la bieno. Oni planis profundigi la korton, transformi la kavon en spektajn kaj fari tegmenton super ĝi. Sed ekprotestis protektantoj de la historia aspekto de Moskvo, aktivuloj de la movado *Arĥnadzor* (Arkitektura inspekto). La laboroj estis haltigitaj. Ambaŭ flankoj havas siajn argumentojn kaj siajn defendantojn, sed ĝis nun la problemoj ne estas solvita.

Anna kaj Mati PENTUS




Sen Rodin Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbendaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyí.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL:
24,00 € + af franko
(tradicia bindita versio),
14,40 € (ePub aŭ Mobipocket).



ST STEV

**Kontribuojn por
la rubriko Scienco
de Monato
kunlaborantoj sendu al
scienco@monato.net.**

Memsanigaj materialoj?

Kiam oni rompas oston aŭ vundiĝas, molekuloj en la korpo ekreagas, provante sanigi la lezon. Scien-
cistoj nuntempe serĉas eblojn por en-
konstrui similan kapablon de memriparo
en ne-organikajn materialojn.

Ne tiom simpla

La organoj de la korpo estas tre
flekseĝemaj. Kontraste, kiam temas pri
artefaritaj materialoj, ĝis nun oni strebis
krei materialojn kiel eble plej fortajn kaj
solidajn. La granda defio estas enkonstrui
flekseblecon en materialon ne perdi-
gante al ĝi la aliajn ecojn. Krome neces-
as eviti nocajn efikojn. Ekzemple, por
malhelpi metalkorodon, oni uzas kroma-
to-pigmenton. Ŝajnas bona ideo kombini
tion kun memriparaj ecoj de polimeroj;
tamen la pigmento estas kanceriga. Do
necesas trovi alian eblon.

Esploroj

Facile kompreneblas ke la usona
NASA (*National Aeronautics and Space
Administration*/Tutlanda Aeronautika
kaj Spaca Administrado) havas tiuri-
latan esplorcentron, ĉar riparoj en la
kosmo estas ekstreme malfacilaj. Ankaŭ
aviadilkompanioj povus ege profiti de
memripareblecoj de fendetoj dum flu-
gado.

Sed laŭ profesoro Herman Terryn de
la Libera Universitato en Bruselo, Fland-
rio kaj Nederlando havas pioniran rolon
en la esploroj kaj certe ne postrestas
kompare al NASA.

Realigoj

La esploroj estas ankoraŭ en eksperi-
menta fazo sed oni povas atendi prakti-
kajn aplikojn en la venontaj jaroj.

Jam ekzistas okulvitroj por skiantoj
sur kiuj etaj skrapaĵoj ripariĝas sub in-
fluo de suna varmo. La aŭtokonstruisto
Nissan eksperimentas pri simila tekniko
por memriparo de skrapaĵoj en lako de
aŭtomobiloj. Ĝis nun tio eblis nur por
nigra lako pro ĝia granda ensorbo de
varmo kaj ne sukcesas kiam temas pri
ripetaj difektetoj aŭ karoserio plena de
skrapaĵoj.

En Nederlando, oni kovris en de-
cembro 2010 kvarcent-metran strion
de aŭtovojo per memripara asfalto.
Oni aldonis ŝtaldrateton konektitan
al elektra bobeno. Ĉi tiu povas sendi
kurenton en la drateton kaj tiel var-
migi ĝin ĝis 60 gradoj celsiaj. Tiel la
asfalto iom fandiĝas kaj la fendetoj
fermiĝas. La unuaj rezultoj estas kon-
tentigaj. Nun oni pluesploras en labo-
ratorio kiom ofte necesas apliki tiun
fandoprocedon: ĉu ĉiuprintempe aŭ
eble ne ĉiujare.

En Belgio oni eksperimentas per
aldono de neaktivaj bakterioj en beto-
non. Kiam estiĝas fendetoj, la enfluantaj
akvo kaj aero restimulas la bakteriojn
kaj tiuj ekproduktas kalkoŝtonon kaj tiel
la fendetoj refermiĝas.

En alia eksperimento oni aldonas
polimerojn. Kiam la betono fendiĝas, la
polimeroj ekkontaktiĝas kaj refermas la
fendojn.

La ĉiujaraj postvintraj riparoj de
aŭtovojoj estas granda zorgo en mo-
derna lando kaj sendube oni kiel eble
plej baldaŭ provos apliki la menciitajn
teknikojn en la praktiko.

La grandaj industrioj investas pli kaj
pli en la esploradojn de sinriparantaj ma-
terialoj kaj oni povas do atendi multajn
aplikojn en la venontaj jaroj.

Ivo DURWAELE

Naiva elreviĝo

„Hilda ĵus preterpasis, fronte al ni.”

„Ha, mi ne rimarkis.”

„Beleta, ĉu ne?”

„Estas vi, kiu ŝatas ŝin, ne mi. Blunkulaj blondulinoj ne estas mia preferata tipo de knabino.”

„Jes ja! Vi jam plurfoje asertis, ke vi havas simpatian al ŝi nur kiel via najbarino ... Vi pli ŝatas nigrokulajn brunulinojn, ĉu ne?”

Apenaŭ elirintaj el infanaĝo, knaboj provas naivan penetradon en adoleskecon tra ina pordo. Profunda amikiĝo interligas tiujn du ekde fruaj jaroj – ili eĉ ne scias, de kiam – kaj ambaŭ jam ne kapablas kondukti unu sen la alia. Valdemaro senlime konfidas al Adolfo siajn plej intimajn sekretojn kaj pensojn. Do, tion, kion li sentas pri la junulino, li ne kaŝas al la alia, des pli ke, kiel ŝia najbarino, li povos helpi lin. Veraj amikoj, eble por ilia tuta vivo. En amuziĝo, ludoj kaj projektoj de junaĝo ili ĉiam interkonsentas.

Peneme sukcesinte venki sian atavisman pudoron, Valdemaro kuraĝis demandi, ĉu la amiko estas preta transdoni al Hilda amdeklaran mesaĝon lian cele enamiĝan konsenton ŝiaflanke. Anstataŭ tuja jeso, Adolfo anoncis, ke ilia komuna amiko Ĵeromo ja estis petinta de li similan komplezon.

„Ĉu ankaŭ li interesiĝas pri Hilda?”

„Jes ja! Ankaŭ li, ne nur vi. Ĉu ŝi ne estas beleta? Do, eltenu!”

Ŝoko trafis Valdemaron pro tio, de li ne atendita. Konkursanto? Lia unua amo disputata ankaŭ de aliulo ... Vere embarasita, li ekpleniĝis de timo ne scipovi regi la cirkonstancojn. Li sentis sin antaŭtempe venkita, kvazaŭ falinta en inkubsonĝon.

„Jen tie venas Ĵeromo! Profitu por solvi la problemon kun li.”

Al Valdemaro iĝis ankoraŭ malpli komforte, ĉar kontraŭstarigado povus

konduki al kverelo ne dezirata de li. Ne atentante la embarason de sia amiko, Adolfo alparolas la ĵus alveninton:

„Bone, ke vi ĝustatempe aperas ĉi tie. Ankaŭ Valdemaro petis de mi transdoni amdeklaron al Hilda.”

**Peneme
sukcesinte venki sian
atavisman pudoron,
Valdemaro kuraĝis
demandi, ĉu la amiko
estas preta transdoni al Hilda
amdeklaran mesaĝon lian
cele enamiĝan konsenton
ŝiaflanke.**

„Ĉu ankaŭ vi, Valdemaro? Tion mi ne atendis ... Sed ne ĝeniĝu, ĉar tio ne gravas. Ni ambaŭ povos konkuri kune. Ĉu ni ne estas amikoj? Kaj nian amikecon ni ne fuŝos pro simpla incela afero. Ĉu vi konsentas? Ni lasu ŝin decidi, kiun ŝi elektos; knabinoj ne mankas al mi ... kaj ankaŭ ne al vi, ĉu ne?”

La fanfaronado de Ĵeromo vundis la seriozan sintenon de la pasiĝinta Valdemaro, kiu pro honto ne kapablis tion elmontri al la aliaj du. Adolfo ŝiaflanke laŭte reklamadis la okazaĵon, kvazaŭ en aŭkcio. Tre malfacile la enamiĝinto eltenis tian multvortecon. Liaj tro intimaj korszentoj estantaj tiel publike priklacataj, kiel plej malnobla komerca varo. Sed li ne kuraĝis forpuŝi ilian teniĝon, manke de rimedo por rekte kontakti ŝin sen scio kaj helpo de alia homo.

„Ĉar Adolfo tute ne interesiĝas pri Hilda, li povos, kiel nia amiko kaj ŝia najbarino, transdoni al ŝi niajn du mesaĝojn samtempe, kaj ricevi de ŝi la respondon liverotan al ĉiu el ni. Ĉu vi konsentas?”

laste proponis Ĵeromo.

Post tiu interkonsento, tuj la sekvan-tan tagon, Adolfo akceptis iliajn komisi-ojn, kaj ... la du „konkursantoj” restis en atendo ...

... Atendo ... atendado ... atendado ... La tempo pasis: unu, du, tri tagoj ... unu semajno ... du ... unu monato ... Tro da tempo por vivavidaj junuloj.

Ĝis ... iutage Ĵeromo informis Valde-maron:

„Mi sciigis, pere de amikino de Hil-da, ke Adolfo jam de longe ricevis ties respondon.”

„Do, kian respondon?”

„Tion mi ne sukcesis ekscii. Sed lia prokrasto transdoni ŝian respondon tute malbonodoras al mi. Antaŭ niaj pluraj insistoj, li ĉiam senkulpigis sin, asertante, ke li ankoraŭ ne estis ricevinta ĝin de ŝi. Kial li mensogis?”

„Ho, ne! Li estas nia amiko!”

„Ĉu vere?”

„Li ĵus preterpasis survoje hejmen.”

„Do, ni tuj trafu lin ĉe li.”

Surprize demandita de la du amikoj, Adolfo ekbalbutis konfuzan nekonvin-kan respondon, sed sub intensa premado de la aliaj, li fine konfesis, ke la res-pondo de Hilda estis favora al li mem, akceptinte lin kiel ŝian enamiĝinton.

„Kio!?! Kiel, se vi ne estis intere-sata?!?! ...” eĥis la du.

„Sed ... sed ...”

„Sed kio? Perfido via!” laŭte skoldis Ĵeromo.

„Vi, de tiom longe mia amiko? ...” ĝemis Valdemaro.

„Vi senkaraktera perfidulo! Malno-blega ago la via! Kovarda senhontulo! Cinika ulaĉo! Vi naŭzas nin!!! ...”

Pluvego da ofendaj nomoj falis sur lin, elŝprucis obscenaj akuzoj, ĝis elĉerpiĝo de ilia aĉadajektiva vortopro-vizo! ...

Eriko NAVARO

Spaco kaj lingvo – ĉu facila afero?

Ĉie en la mondo la homoj, sendepende de kulturo, lingvo kaj aĝo, povas percepti la fenomenon „spaco” laŭ la samaj fizikaj leĝoj (gravas precipe gravito) kaj per la samaj korpaj iloj. Estas tial atendeble, ke en la homaj lingvoj por la esprimo de spacaj rilatoj aperas la samaj aŭ almenaŭ tre similaj kategorioj. Aŭ ĉu ne estas tiel simple?

Longtempa neglekto

Spaco en lingvo unuavide ŝajnas ege facila afero: necesas nur identigi la unuopajn elementojn kaj priskribi ilin laŭ ekzaktaj trajtoj, ekzemple koordinatoj. Kaj longe lingvistoj pro tiu supozo ne esploris speciale la onidire universalajn spacajn konceptojn de lingvoj, sed analizis nur iliajn konkretajn gramatikajn esprimilojn.

Nur kiam la t.n. „kognitiva lingvistiko”¹ en la 1980aj jaroj ekstudis grandan nombron da plej diversaj lingvoj,

montriĝis, ke tiaj universalajoj en strikta senco ne ekzistas, kaj ke la lingvoj eĉ ne tre similas unu al la alia en la esprimo de spaco. Krome, eĉ ene de unu lingvo fizike identaj aranĝoj surprize povas havi neidentan esprimon!

**Ĉie en la mondo la homoj,
sendepende de kulturo,
lingvo kaj aĝo, povas percepti
la fenomenon „spaco” laŭ
la samaj fizikaj leĝoj
(gravas precipe gravito) kaj
per la samaj korpaj iloj.**

Jen ekzemplo: oni diras, ke fromaĝo kuŝas *sub* kloŝo, sed se oni anstataŭigas la fromaĝon per fumo, tiu troviĝas *en* la kloŝo. Kono de la spaca rilato inter la kloŝo kaj ĝia enhavaĵo ne sufiĉas por esprimi de tiu rilato: en ĉi tiu ekzemplo pli

gravas, ĉu la kloŝo retenas la enhavaĵon aŭ ĉu ne.

Variaj vidpunktoj

Ni vidas, ke malgraŭ sama reala bazo eblas havi malsaman lingvan rezulton – spaco en lingvo do ŝajnas ege malfacila afero, kiun oni devas studi en ĉiu lingvo denove. Kaj, fakte, la lingvoj povas malsami en preskaŭ ĉiu aspekto, pri kio mi donu nur malmultajn ekzemplojn (aliokaze estiĝus libro, ne artikolo).

Oni povus pensi, ke rilatoj kiel „antaŭ”, „super”, „dekstre” ktp estas universalaj, ĉar ili ja baziĝas sur logika, matematika koordinatsistemo. Sed fakte ekzistas multaj lingvoj, kiuj ne konas la konceptoparon „dekstre-maldekstre”.

Plue, la unuopaj konceptoj povas esti uzataj diversmaniere: kie eŭropanoj diras „ŝi kaŝas sin post la arbo”, parolantoj de la okcident-afrika lingvo haŭsa diras „*antaŭ* la arbo”, ĉar ili donas al objekto



kiel arbo fronton laŭ „tandema” principo, ne laŭ la „spiegula”. Kompreneble ja arboj ne de si havas fronton kaj aliajn flankojn, sed la homo devas atribui tiujn al ili².

Eĉ pli interesa estas la gugujimitira (*Guugu Yimithirr*), aborigena lingvo en la nord-orienta Aŭstralio, kiu entute ne konas tiajn rilat-indikajn esprimojn, sed nur absolutan orientiĝon laŭ la kompas-direktoj. Parolanto de tiu lingvo do en nia ekzemplo povus diri ekzemple „ŝi kaŝas sin nord-oriente de la arbo”, kaj tute ne gravus, de kie li mem rigardas.

Ekspérimentoj montris, ke tiuj t.n. referenckadroj influas eĉ la percepton de la parolantoj. Kutime la sistemoj ekzistas unu apud la alia (eble nur parte); ilia uzo ofte dependas de la situacio.

Troviĝo kaj moviĝo

Ankaŭ ĉe poziciaj verboj oni trovas grandajn diferencojn. Ekzistas lingvoj, kiuj entute ne havas tiajn verbojn aŭ uzas nur la kopulon: „la telero (estas) en la korbo”. La nederlanda uzas la verbon „sidi” en tiu ĉi frazo, kaj la germana – „kuŝi”.

Sed ekzistas ankaŭ lingvoj kiel la celtala (majaa lingvo el centra Ameriko), kiu havas pli ol 100 poziciajn verbojn. Por kio ĝi bezonas tiom? Ĝi simple esprimas per ili la rilatojn, kiujn ni nomas per prepozicioj, kaj pro tio havas nur unu prepozicion. Dum en Esperanto oni kutime diras „la telero estas en la korbo”, en la celtala oni esprimus la frazon pli-malpli per „la telero enas je la korbo”!

Tio denove montras, ke eblas esprimi la saman aferon per malsamaj rimedoj: aliaj lingvoj ekzemple uzas nek verbojn, nek prepoziciojn, sed lokajn kazojn – la kaŭkaza lingvo tabasarana havas eĉ 40 da ili. Se prispacaj informoj povas aperi en plej diversaj lokoj en la frazoj, tiam oni kompreneble povas ilin esprimi kun pli aŭ malpli granda ekspliciteco.

Jen ekzemplo: la frazo „li iras en la domon” en la hitita, hindeŭropa lingvo parolita en Anatolio en la dua jarmilo a.K., fariĝus „*n(u)=as=an anda parna payizzi*”, kie la moviĝo estas esprimita

eĉ kvinfoje (interalie per vortordo). Sed jam tri jarcentojn poste ankaŭ en la hitita la frazo estus „*n(u)=as parni anda paizzi*”, kie nur la verbo plu montras moviĝon, dum la aliaj esprimiloj kaj la vortordo neŭtraliĝis tiurilate.

Do ja ekzistas universalaj, sed ili ne preskribas, kiel ekzakte oni ion esprimu; ili nur donas kriteriojn, laŭ kiuj oni povas kategoriigi spacajn aranĝojn.

Ne senesperige

Aspektas do, kvazaŭ la plej dika kaj multĉapitra gramatiko estus tiu de spaco, dum ekzemple por la esprimo de tempo oni povas fari ĝeneraligojn, kiuj validas en ĉiuj lingvoj. Sed tiel senesperige ne estas, kiel montris aliaj esploroj. Evidentiĝis, ke la formado de lingvaj kategorioj havas komunan bazon, nome la percepteblan realon.

Komparante, kiel diversaj lingvoj esprimas 11 tre bazajn aranĝojn, kiel ekzemple (1) „taso sur tablo”, (2) „muŝo sur fenestro” aŭ (3) „pomo en pelvo”, la lingvistoj trovis ja ĉian penseblan variadon. Ekzemple en la hispana ekzistas por tio nur unu prepozicio („*en*”), en la pola, kiel en Esperanto, du („*na*” = „sur” kaj „*w*” = „en”), kaj la germana havas tri prepoziciojn („*auf*” por 1, „*an*” por 2 kaj „*in*” por 3). Oni trovas tiom da malsamaj grupigoj en la lingvoj, ĉar oni povas koncepti la aranĝojn laŭ diversaj kriterioj (fiksa aŭ malfiksa kontakto, vertikala aŭ horizontala aranĝo ktp). Sed ili ja havas universalan bazon: la homan percepton.

Do ja ekzistas universalaj, sed ili ne preskribas, kiel ekzakte oni ion esprimu; ili nur donas kriteriojn, laŭ kiuj oni povas kategoriigi spacajn aranĝojn. Tio estas grava eltrovo, ĝi montras, ke kvankam la lingva esprimo de spaco ne estas unueca, ĝi tamen ne estas hazarda, sed sekvas kognitivajn principojn. Intertempe oni trovis kelkajn tiajn

universalajn. Por ĉiuj validas, ke oni ne povas antaŭvidi la konkretajn kategoriojn, sed ja povas kompreni la principojn, sur kiuj ili baziĝas.

Jam tiu tre mallonga ekskurso tra la bunta mondo de lingva esprimo de spaco montris, ke ne ekzistas kategorio en la lingvo, kie prispaca informo ne povas aperi. Tio respondas ankaŭ la demandon, kiu okupis lingvistojn delonge: kial ekzistas gramatika kategorio por tempo en multege da lingvoj, sed nenio tia por spaco, kvankam ĉi-lastas estas tiom grava? Ĉar por spaco unu kategorio ne estas sufiĉa: ĝi troviĝas simple ĉie, kiel la reala spaco, kiu ĉirkaŭas nin.

Do, ĉu spaco kaj lingvo estas facila aŭ malfacila afero? La vero, kiel ofte, troviĝas intere kaj dependas de la vidpunkto. Temas pri kompleksa fenomeno, sed samtempe la universalaj montras, ke lingvoj ja povas ege diferenci, sed ne kapricas, do estas iom antaŭvideblaj – spaco en lingvo do, finfine, ŝajnas ege interesa afero.

Kirilo Brosch

Pri la aŭtoro: Cyril Brosch studis hindeŭropan lingvosciencan, orientalistan kaj interlingvistikon. En 2011 li finis doktorigan disertacion pri la esprimo de spaco en la hitita lingvo.

¹ La bazo de tiu branĉo de lingvoscienco estas la hipotezo, ke la percepto (latine „*cognitio*”) esence influas kaj direktas la homajn lingvojn.

² En la japana, parenteze, oni ĉi-situacie ne povas uzi la vortojn „(mal)antaŭ”, sed devas diri „je la alia flanko”.



**Kontribuojn por la rubriko
Lingvo de Monato
kunlaborantoj sendu al
lingvo@monato.net.**



La gramatikiloj de Esperanto laŭ ABC

Per sia franclingva verko *Les outils grammaticaux de l'Espéranto* (La gramatikiloj de Esperanto) André Cherpillod liveras al la franclingva esperantistaro gramatikan ĉefverkon, similan al la famaj PMEG kaj PAG. La aŭtoro elektis kiel ekirbazoj kaj aliron al la temo la 236 plej bazajn vortojn, vortetojn, prefiksojn, sufiksojn kaj finaĵojn de Esperanto, do tiujn ilojn, per kiuj oni strukturas siajn pensojn por muldi propoziciojn, frazojn kaj plurelementajn vortojn.

Tiujn „ilojn” por konstrui propoziciojn la aŭtoro klare apartigas de la „aĵoj” – do de la vortoj de la ĝeneral-uzata vortostoko („*vocabulaire d'usage*”), kiuj laŭ la necesoj de la epoko povas ŝanĝiĝi kaj sekve ne temiĝas en lia libro. La aŭtoro ordigas ĉion rigore laŭ ABC kaj klarigas tre detale la uzon de ĉiu ilo. Ĉe tio li uzas la laŭnorman terminaron de la franclingva gramatika analizo, aldonante el Esperanto, tamen, unu francan neologismon – „*subjunction*” – ĉar la normala franca termino „*conjonction de subordination*” iom tro longis.

Ne-lege

Libron ĉi-specan oni ne legas paĝon post paĝo, sekcio laŭ la skemo A, B, C ..., eble kiel oni legus la monde faman krimromanon *La ABC-murdoj* de specifa angla Agata. Ne, libron ĉi-specan oni tute ne legas. Oni konsultas ĝin. Se oni fronte tian preskaŭ ducentpaĝan verkon, presitan parte malgrand-tipare, entute konvencie legemas, oni prefere sekvu la konsilon de la aŭtoro mem. Enkonduke li skribas: „Kiam oni havas liberan kvaronhoron, malfermu laŭ hazardo tiun ĉi libron kaj legu kelkajn paĝojn. Vi vidos, tio estas profitdona ...”. Ĝuste tion la recenzanto faris.

Bona komenco fronte al gramatikaj verkoj estas kontroli la eldirojn pri „po”,

„ol” kaj „da”. Kial? Kvankam la recenzanto perfekte regas tiujn vortetojn, li ĉiam denove suferas specon de mensa konfuziĝo kaj firme kredas subite ilin ne plu regi. Feliĉas okaze de tia cerba portempa paneo tiu, kiu havas ĉemane la Ĉerpilodan „Les outils” [lezutí]. Do antaŭen al la ekzamenado de tiu ĉi „Lezutio”.

Poe kaj ole

La sekcio pri „po” ampleksas tri paĝojn. Ĝi memorigas pri la klarigoj en PMEG, kvankam nun en alia lingvo kaj per alia lingvaĵo. La klarigoj estas perfektaj, nur specifa noto iomete misas. En tiu la aŭtoro atentigas, ke latinidoj kaj ĝermanoj ne posedas tian vorton en siaj lingvoj. Nu, la germana certe estas lingvo sufiĉe ĝermana kaj jen troviĝas la vorteto „je”. Ekzemple *Ich gab den drei Mädchen je drei Küsse* (Mi donis al la tri knabinoj po tri kisojn). Do sume naŭ. Kia diabla fiĝojo tuj esti trovinta eraron ĉe tiom renoma aŭtoro! Evidente recenzantoj nur pagiĝas poe por ĉiu trovita eraro.

Cherpillod tute prave emfazas, ke „po” rilatas nur al nombro aŭ mezuro, ne al la substantivo tuj poste. Pro tio en frazo kiel: „Al ĉiu li donis po kvin dolarojn”, estus logike uzi la akuzativon – do, por paroli „pomege”, la objektan

rolfinaĵon „-n”. Samkiel en PMEG oni avertas pri misuzoj en frazoj kiel „kilometrojn xx horo”. Konate, „xx” povas esti preskaŭ ĉio sub la suno, nur ja ne „po”.

Po-uminte nun sufiĉe, ni iru al „ol”. Kiel en la antaŭa specimeno de la teksto, ĉieas klaraj klarigoj. La sekcio ampleksas unu paĝon. Iomete surprizas la ekzemplo: „Pli bone estas vivi malriĉa, ol se oni riĉiĝas ŝtele”. Iel iomete stranga formulo. Ĝisfunde kiel ĉie en tiu ĉi verko, oni ne forgesas mencii la kombinaĵon „post ol”, formulo tiel ofte videbla kiel la onidira „terura neĝulo” sur la montaj deklivoj de Himalajo.

Dae kaj dee

Do ek al „da”, laŭ la aŭtoro prave, prepozicio rilatiganta mezuron al mezurataĵo. En la franca ekzistas la koncepto „da” – aliaj lingvoj konas nur „de”. Do ne estu malfacile klarigi tion franclingve. La aŭtoro bezonas por tio unu paĝon kaj duonon. La klarigo ĉe la fino de la sekcio estas, tamen, tre tradicia – do rilatanta al rozoj en bukado – helpe de la imagaj, tute ne voĉigitaj, demandoj: „Kiom da rozoj?” kaj „Kia bukado?”. Do laŭŝajne ankaŭ francoj dae iomete ŝanceliĝas. Evidente, en la praktika vivo nur virinoj demandus tiel pri la nombro da rozoj kaj la speco de la

bukedo. Viro tuj demandus: „Kiom kos-tas la rozoj?”

Tuj post „da” laŭalfabete sekvas la sekcio „de” – kvar paĝoj kaj duono. Uff! Sed aliflanke, PMEG bezonas ses paĝojn. Nia „de” estas speco de ĥameleono kun pluraj signifoj kaj roloj. Pro tio ĝi sufiĉe ofte ambiguas – ekzemple en la frazo: „la lingvo de Zamenhof” – ĉu jen la lingvo, kiun Zamenhof scipovas, aŭ ĉu jen la lingvo, kiu devenas de Zamenhof? Pri tiaĵoj detale atentigas la aŭtoro.

Nelge

Les outils laŭ multaj facetoj similas al PMEG. Temas, tamen, pri alia aliro – aliro, ne laŭ gramatikaj strukturoj kaj metodoj enfrazigi, sed baze de la 236 elektitaj vortelementoj alfabeto ordigitaj. Tiu enlistigo laŭas unuavide la aldonan indeksan aliron de PMEG. Tamen nur unuavide. Konsultante la indeksojn de PMEG, ekzemple, pri „de”, oni estas kondukata al multaj diverstemaj sekcioj. Irante al la sekcio „de” en *Les outils*, oni alteriĝas meze de ĉiuspecaj imageblaj de-aĵoj en unu sama sekcio. Denove kompare, la aŭtoro de PMEG enkondukis sufiĉe simplajn, tamen novajn kaj ne de ĉiuj amatajn gramatikajn terminojn por priskribi la elementojn de propozicio. „*Les outils*” uzas la kutiman, eble iomete elitecan, latinbazan lingvaĵon, kiun oni sendube lernas en ĉiu franca lernejo.

Inter la kovriloj troviĝas ankaŭ kelkaj neoficialaj vortetoj – klare markitaj tiaj. Tamen kial vortoj kiel „nelge”, „fri”, „sob” kaj „sor” aŭ pseŭdosufiksoj kiel „-ik” kaj „-esk” nepre eniris la liston de bazaj gramatikrilataj neŝanĝeblaĵoj de Esperanto, pri tio la aŭtoro ŝuldas al ni klarigon. La elekto verdire estas almenaŭ ekvide jen kaj jen iomete arbitra. Fine estas listo de sciencaj afiksoj kaj post tiu, jen listo de diversfonte kolektitaj interjekcioj kaj onomatopeaĵoj – alivorte krivortoj kaj sonvortoj. Do nun danke al *Les outils* ne plu estos malfacile adekvate kluki kiel kokino.

Ekstare

Ĉiu gramatike interesata esperantisto havas sur sia bretaro almenaŭ la verkojn

UV, PIV, laŭmone NPIV, kaj PAG. Ĉe multaj ekde la interreta alveno de PMEG la ĥaose organizita PAG orfiĝis, nun nur kolektante polvon kaj araneaĵojn en iu malluma angulo. Same la interrete konsultebla kaj plene senkosta vortaro REVO, almenaŭ por ĉiutagaj aferoj, duone detronigas PIV-on – simple pro la pli facila alireblo per komputilo.

Se oni entute iam emus forlasi sian komputilan klavaron kaj de mola brakseĝo stariĝi por konsulti gramatikregularon libroforman, la ĉi tie preparolata verko certe povus esti la motivdonanto por tia muskolstreĉa fizika ekzerco. Fakte, la recenzanto entuziasmiĝas pri la libro, ĉar fine jen serioze konsiderinda konkuro por PMEG. Oni povas bone kompari la ambaŭverkajn eldirojn. Cetere, en *Les outils* oni lernas ne nur multe pri Esperanto, oni lernas ankaŭ multe pri la franca. Do ĝi ricevos ĉe la recenzanto honorlokon kaj sendube estos ofte uzata.

Kroze

Evidente, la recenzanto kontrolis ne nur tiujn ĉi malmultajn sekciojn. Krozante tra la paĝoj, li trovis interesan ekzemplon en la sekcio „kiom”. Jen ĝi: „Li estas tiom inteligenta kiel verkisto, kiom stulta kiel financisto” – citaĵo el PAG. Elkalkuli la precizan signifon povus postuli de iu kaj iu leganto eble iomete da cerbumado. Al la recenzanto unuavide klaris nur, ke la skribanto de la frazo ne speciale ŝatas financistojn. Ankaŭ interese, la aŭtoro enklasigas „-aŭ” kiel finaĵon, do ne kiel parton de la radikoj. Tion li faras pli klare ol en PMEG kaj dediĉas mallongan sekcion al ĝi.

Menciinde estas, ke la verko estas dimensie ne tre granda kaj ankaŭ ne tre peza. Jen 15 x 21 x 1 cm kaj nur 248 g. Do ĝi povas tre praktike lokiĝi ĉemane sur la skribotablo. Per la pli ol 1,3-kilogramo PIV oni povis ĉiam senpene mortbati iun obstinan oponanton el alia skolo. Per *Les outils* ne plu. Eble nur iomete draŝi – kaj nur kondiĉe, ke la oponanto ankaŭ sufiĉe bone scipovas la francan por akcepti ĝiajn eldirojn! Aliflanke, oni ne tro ofte batu iun ajn aŭ ion ajn per tiu ĉi nova Ĉerpilodaĵo, ĉar ŝajnas,

ke ĝi estas nur glubroŝurita. Do estas re-ala danĝero, ke iam la folioj elfalos el la iomete fiziaspekta nur dikpapera spino.

Kvize

En Esperantujo ĉiu vere grava verko, evidente, havu enŝovitan tuj elfalontan paperan slipon kun listo de preseraroj. Ĉe *Les outils* la afero statas iomete alie. Slipo tuj elfalis, sed ne kun eraroj – la slipo prezentas mallongan kvizon. Jen 17 demandoj pri ĝusta formulado en Esperanto. La temoj estas apliko de „la”, akuzativo, transitiveco ktp. Pri la 17a kvizero la recenzanto iomete hezitas. Jen: *La maison est située contre la mairie* – kaj la proponata traduko: „La domo estas situita kontraŭ la urbodomo”. La frazo entenas du erarojn. Kiujn? – Hmm. – „estas situita”, evidente, estu „situas” aŭ „lokiĝas” aŭ „troviĝas”. Sed kie, damne, estas la dua eraro? Nu, premio ne menciigis, do oni povos supozeble pace plu vivi, ne trovinte la duan eraron.

Ho, heŭreka! Trovite! Vere ne pretervideble! Ĉu ankaŭ vi, leganto, tuj trovos la duan eraron?

Sed ni metu ŝercojn flanken kaj iomete serioziĝu. *Les outils grammaticaux de l'Espéranto* estas, kvankam franglingva, ĉefverko pri la gramatika ilaro de Esperanto kaj definitive bonega gvidilo por ĉiuj komencantoj kaj progresintoj, scipovantaj la francan. Kritikinde estas nur, ke la verko ne publikiĝas ciferece taŭge por komputiloj kaj legiloj, kaj ke la elekto de kelkaj el la kapvortoj estas iugrade arbitra.

Pejno Simono

PIV: Plena Ilustrita Vortaro
NPIV: (nova eldono) Plena Ilustrita Vortaro
REVO: Reta Vortaro
PAG: Plena Analiza Gramatiko
PMEG: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

André Cherpillod: *Les outils grammaticaux*. Franglingva. Eld. Éditions de la Blanchetière, Courgenard, 2009. 185 paĝoj, glue broŝurita. ISBN: 2-906134-84-8.

Prezo ĉe FEL: 15,90 EUR + afranko.

Aventuro portita al pli alta ŝtupo



En la nuna romano, Declerck traktas la ĥemion de multjaraj familioj kaj la fizikon de tiuj, kiuj ekfamilios, en la perspektivo de okcidenteŭropa urba etnomikso.

Probal DASGUPTA

Christian Declerck:
Spitaj – kiel hidrargo.
Eld. Flandra Esperanto-Ligo,
Antverpeno, 2008.
ISBN 978-90-77066-00-3.
Tradicia libro de 208 paĝoj kudre
binditaj: 20 € + afranko;
elektronikaj versioj
(ePub, Mobipocket kaj PDF): 12 €.

Rigardo sur la milito en Alĝerio



Unue, klarigoj pri la titolo de la libro: „Tuikero” estis la propra nomo de alĝeria harkio, amiko de la aŭtoro. „Harkio” estas ĝenerala alnomo de islamaj soldatoj alĝeriaj, kiuj batalis flanke de la francoj, kontraŭ alĝeriaj sendependismaj soldatoj dum la milito inter Francio kaj Alĝerio (1954-62).

Roger Condon estis 19-jara konskripto, kiu servis dum 21 monatoj en la franca armeo. La libro temas pri lia nuna memoro pri tiu konskripta sperto, surbaze de liaj notoj el tiu periodo plus nun nur pluenmensaj memoroj. Do aŭtobiografia verko, tre interesa kaj, krome, informata.

Malgraŭ la titolo *Tuikero la Harkio kaj la cetero*, la persono Tuikero preskaŭ ne rolas en la rakonto, kiu konsistas preskaŭ ekskluzive el „la cetero”. Tamen tiu „cetero” estas multenhava, kaj

vere legenda.

Condon ne malŝparas siajn paĝojn per rakontado pri bataloj, atakoj kaj aliaj fimilitaĵoj (lia takso, krome ankaŭ mia). Anstataŭe li priskribas sian vivon dum tiuj jaroj, la multajn stultajn ordonojn faritajn de armeestroj, komforte sidantaj en Francio tute sen scio pri la realaj kondiĉoj, kiujn frontas la francaj armeanoj en Alĝerio; la neniam oficiale agnoskitan uzadon de metodoj, akceptataj ambaŭpartie, por ebligi ĉiutagan vivon sen danĝera interkonflikto ktp ktp.

La fiforlaso de la „harkioj” fare de la franca arme-administrantaro, tiel ke tiuj alĝeriaj franc-helpintaj harkioj suferis persekuton kaj murdadon en Alĝerio, pro tio ke la franca armeo memplaĉe „forĝesis” ilin post la fino de la milito, forte skuas la senton de la aŭtoro pri la „civiliziteco” de la francaj agoj kaj principoj.

Kvankam, prave, kontraŭmilita, ĉi tiu libro konigas nur la vidpunkton de sia aŭtoro pri la ĉiutaga soldata vivo kaj ne tede ripetadas laŭ la maniero de propagandaj verkoj. Tial kaj por- kaj kontraŭ-milituloj povas ĝui la rakonton kaj kunsenti kun ĝia verkinto.

La libro estas tre fortike broŝurita. Oni tre zorge korektocele tralegis ĝin, tiel ke kritikinda estas nur la kvalito de la papero uzita.

Donald BROADRIBB

Roĝero Kondono (Roger Condon): *Tuikero la Harkio kaj la cetero*. Eld. Eldona Fako Kooperativo de SAT, (loko ne indikita), 2010. 150 paĝoj, kudre broŝurita. ISBN 978-2-918053-04-0, laŭ paĝo 6; 978-2-918053-02-6 laŭ la malantaŭa kovropaĝo.

Prezo ĉe FEL: 16,46 eŭroj + afranko.

anoncetoj

Kreu vian propran librokatalogon!

Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Nidenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozsef.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>


La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



LA GRAFO DE

MONTE-KRISTO

**La vivoverko de
Alexandre Dumas kaj
la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand**

Oni kutimas konsideri la libron La Grafo de Monte-Kristo kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re)legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li konatiĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian junecon, lian feliĉon.

A. DUMAS



**LA GRAFO DE
MONTE-
KRISTO**

Eldonjaro: 2010

Tradicia bindita versio (en 2 volumoj): formato 135 x 210 mm, pezo 1333 g, 1184 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-43-0; prezo ĉe FEL: 96 EUR + afranko.
Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 32 EUR